DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (946) • 2021 •

# *Kelkaj anĝeloj ...*



havas faldajn vizaĝojn kaj kalajn manojn,
sed ili konas la vojon kaj ties danĝerojn,
ili prenas nin firme al la mano
kaj gvidas nin
kun la tuta sperto de iliaj jaroj,
se ni devojiĝis.

Kelkaj anĝeloj

paŝetas scivoleme sur gambetojn en la vivon,
ne havas antaŭsenton, kien la vojo gvidas,
sed ili prenas nin
kun brilanta rideto
kaj plene de senlima konfido
firme al la mano
kaj esperas, ke ni gvidas ilin.

Kelkaj anĝeloj

eĉ ne scias, ke ili venas de Dio,
nur, ke ili estas destinitaj unu por la alia
kaj ne rajtas malteni ilin.

Inge Müller, DE
Tradukis Siegfried Krüger, DE

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Simeono | 3 |
| Hereza evangelio | 6 |
| Gardanĝeloj | 12 |
| Internacia preĝosemajno 2021 | 13 |
| El la diskutlisto Dia Regno | 19 |
| La malegal(ig)a viruso | 20 |
| Retaj diservoj en Esperanto | 21 |
| Informetoj | 22 |
| Nekrologo Václav Lamr | 23 |
| Aŭskultu do! Nur amo estas Dio | 24 |

## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, daŭre ni vivas sub la ombro de la pandemio, sed ni iom vidas lumon en la malhelo pro la alveno de vakcinoj. Espereble niaj socioj poste povas reiri al pli malpli normala vivo.

Alia lumo, kompreneble, estas ke ni daŭre preparas nian gazeton. Eble ne ĉiam tute regule, kelkfoje kun malfruiĝoj, sed tamen ni daŭre povas sendi la gazeton al la membroj.

Tria lumo en la malhelo, estas ke Wolfram Rohloff daŭre prizorgas retajn diservojn en Esperanto. Sur paĝo 21, vi trovos aktualigitan liston pri la jam sep dissenditaj diservoj.

Kvara lumo estis, ke esperantlingva ekumena preĝsemajno okazis ĉi-jare virtuale kun pluraj diverslandanaj partoprenantoj.

Ĉu vi povas raporti pri iu lumo, kiun vi spertis dum la pandemio? Mi volonte publikigos vian raport(et)on en iu sekvonta numero.

Mi deziras al vi bonan legadon kaj bonan daŭrigon en la pli hela jaro 2021.

# Simeono

Internacia Reta Diservo en Esperanto, 25an de decembro 2020

Philippe Cousson, FR

Kaj jen en Jerusalem estis viro, kies nomo estis Simeon, kaj ĉi tiu estis justa kaj pia, atendanta la konsoladon de Izrael; kaj la Sankta Spirito estis kun li. 26 Kaj estis montrite al li de la Sankta Spirito, ke li ne mortos, ĝis li vidos la Kriston de la Eternulo. 27 Kaj li venis per la Spirito en la templon; kaj kiam la gepatroj enportis la infanon Jesuo, por fari pri li laŭ la kutimo de la leĝo, 28 tiam li ricevis lin en siajn brakojn, kaj benis Dion, dirante:

29 Nun, ho Eternulo, Vi ellasas Vian servanton,
Laŭ Via vorto, en paco,
30 Ĉar miaj okuloj vidis Vian savon,
31 Kiun Vi preparis antaŭ la vizaĝo de ĉiuj popoloj,
32 Lumon por malkaŝo al la gentoj,
Kaj gloron de Via popolo Izrael.

33 Kaj lia patro kaj lia patrino miris pri tio, kio estis parolita pri li; 34 kaj Simeon ilin benis, kaj diris al Maria, lia patrino: Jen ĉi tiu estas metita por la falo kaj leviĝo de multaj en Izrael, kaj por signo kontraŭparolata; 35 kaj ankaŭ vian animon glavo trapasos; por ke la pensoj de multaj koroj malkaŝiĝu.

Luko 2:25–35

Karaj gefratoj en Kristo, karaj gespektantoj, oni ofte parolis pri la nocio de tempo rilate al la savo kaj la kristana kredo. Mi repensis pri tio, kiam mi aŭdis de la usona generalo respondeca pri la loĝistiko pri la distribuado de vakcinoj tra Usono. Li parolis pri la D-Day, la T-Tago. Sed li klarigis, ke en 1944 la T-Tago estis nur la komenco de la fino de la milito. Kaj do li volis diri, ke la vakcinado estas nur la komenco de la fino de ĉi tiu pandemio. Krome, mi ankaŭ antaŭnelonge aŭdis pri ĉi tiu diro atribuita al Martin Luther, sed certe pseŭdografa, kiu estis menciita en kaŝa cirkulero de kontraŭnazia germana pastoro en oktobro aŭ novembro 1944, kiam la malvenko de Hitler ŝajnis certa, kaj sekve la katastrofo en Germanio: “Se oni diros al mi, ke morgaŭ finiĝos la mondo, tiam mi plantos pomarbon”.

Pluraj penssistemoj inkluzivas ĉi tiun nocion pri aparta tago, kiam ĉio ŝanĝiĝos. Por revoluciuloj, estas la Granda Nokto, kiam la ĝenerala striko signos la venkon. Por judismo, kaj sekve kristanismo, ĝi estas la tago de la Sinjoro, ofte konfuzita kun la fino de la mondo, ĝi estas la tago de juĝo, tago de kolero kaj suferado, kaj ankaŭ la tago de la alveno de la Mesio aŭ laŭe lia reveno.

Multaj vane provis determini la daton. Sed neniu scias la tagon aŭ la horon. La tago de la Sinjoro venos kiel ŝtelisto dum la nokto.

Sed fakte, ĉi tiu tago estas ankaŭ la tago de la savo, aŭ laŭ la titolo de franclingva romano, la "unua tago de mia cetera vivo".

Atendi ĉi tiun tagon vivigas, laŭ la homoj, kiel teruro, timo aŭ inverse kiel espero. Ĝuste ĉi tiu espero instigis Simeonon – vivigis lin.

Ni scias, ke en nia mondo estas pli da mallumo ol da lumo, pli da nokto ol da tago. Ne necesas timi la tagon tiel multe kiel la nokton. Laŭ la Evangelio laŭ Johano, Jesuo indikas ke : Dum estas tago, mi devas prilabori la farojn de Tiu, kiu min sendis. Dum estas tago.

Antaŭ pli ol dudek jaroj aperis filmo, kies franclingva titolo estas "tago sen fino" [angle "Groundhog Day", Tago de la marmoto]. En ĝi la sama tago rekomenciĝas, rekomenciĝas, rekomenciĝas. Ĉu ne estas la impreso kiun ni havas rilate al tiu nuna pandemio. Izoliĝo, malizoliĝo, pli aŭ malpli da limigoj, ebleco aŭ neebleco vojaĝi.

La Tago de la Sinjoro rompas tiun ĉi inferan ciklon por reordigi la mondon, la kosmon.

Ni havas problemon kun ĉi tiu Tago de la Sinjoro. Ĉar ĝi pritraktas plurajn signifojn samtempe, ĉar la tekstoj nomas ĝin la Tago de la Eternulo, la tago de la Sinjoro, la tago de juĝo, la tago de kolero, kaj la tago de savo.

En la 18a jarcento vivis fama predikisto de la unua granda vekiĝo en Usono, Jonathan Edwards. Unu el liaj predikoj fariĝis fama : "Pekantoj en la manoj de kolera Dio". Jen unu aspekto de la Tago de la Sinjoro. Antaŭnelonge, alia kristana aŭtoro verkis : "Pekantoj en la manoj de amanta Dio". La alia aspekto de la Tago de la Sinjoro.

La tago, en kiu Dio manifestiĝis, estas plurala. Ĝi indikas la subitan envenon de Dio en la homaron en lia Filo Jesuo Kristo. Estas tiel Kristnasko kiel la kruco aŭ Pasko, aŭ ĝia anoncita reveno. Kaj Jesuo diras al ni, ke Abraham ĝojis pri tiu tago, li vidis tiun tagon, li vidis ĉion, kion enhavas ĉi tiu tago kaj la savon kiun ĝi kunportas.

Tiu estas ankaŭ la tago, kiam savo venis al la domo de Zakĥeo. Tiu estas la tago, kiam ĉiuj komprenis, kiu Jesuo estas por ili, la tago, kiam ilia rilato al Dio estis vestita per fido, espero kaj amo. Tiu estas la tago, kiam ĉiuj troviĝis ĉe la piedo de la kruco kaj antaŭ la malplena tombo, tie, kaj tiam en ĉi tiu preciza momento. Kaj tiu estas ankaŭ la



Simeono kaj Jesuo.
Pentraĵo de Alexej Jegorov, ĉ. 1840

nuna tago por ni, kiuj jam estas en lia Regno, jam en la estonta vivo.

Jesaja diris : “Nur la Eternulo sola estas alta en tiu tago”.

Zeĥarja aldonas : “Kaj tio estos tago sola, konata nur de la Eternulo, nek tago nek nokto; nur vespere montriĝos lumo.” kaj “Kaj la Eternulo estos Reĝo super la tuta tero; en tiu tempo la Eternulo estos sola, kaj Lia nomo estos sola.”

Joel alportas savan koloron : “Kaj ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos.”

Kristnasko estas manifestiĝo de ĉi tiu tago, eterna tago, tago de la Dia pacienco, tago, kiam ĉio ankoraŭ estas malfermita. Johano diras al ni, ke la lumo venis en la mallumon. Ĉi tiu tago pasis, ĝi estas anoncita, ĝi alproksimiĝas, kaj tamen estas okazo antaŭ ni hodiaŭ.

Ni scias, kion Dio atendas de ni tagon post tago. Faru tion “des pli forte, ju pli vi vidas la tagon alproksimiĝanta”, la Epistolo al la Hebreoj memorigas nin.

Petro diras al ni atendi kaj akceli la alvenon de la tago de Dio. Konsiderante ĉi tion, Mateo konkludas sian evangelion per alvoko por atesti: Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, aldonante, ke Jesuo estas kun ni “ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo”.

“Tiu, kiu komencis bonan faron ĉe vi, ĝin perfektigados ĝis la tago de Jesuo Kristo”, skribas Paŭlo al la Filipianoj.

Dum la historio de la Eklezio, por marki ke Jesuo venis, oni anstataŭis paganan feston, tiun de la renaskiĝo de la suno. Kiam en Eŭropo regis kristanisma kulturo, oni en tiu reciklita tago festis Jesuon. Tamen nuntempe, ni estas for de tia tago. Ne nur oni forgesas paroli pri Jesuo. Kaj se tamen jes, oni parolas pri la bebo. La krucon oni vole ignoras. Nia nuntempa festo ne plu rilatas al tiu tago de la Sinjoro. Oni festas, festenas, kaj revenas al la kutima vivo.

Kristnasko estas nun ĉi tiam, sed tiu ĉi tago estas nur la signo de la Tago de la Sinjoro, la tago de savo, la tago de la interveno de Dio en nian mondon kaj en niajn vivojn, pasinta tago, nuna tago, morgaŭa tago kaj eterna tago. Kristnasko estas fenestro al alia spactempo, sed ĝi ne estas nigra truo, nek vermtruo, ĝi estas luma punkto, lumturo, espero, savo.

Amen

Mi volas fini per legado de parto de la 118a psalmo :

21 Mi dankas Vin, Ĉar Vi aŭskultis
min kaj fariĝis mia savo.
22 Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj,
Fariĝis ŝtono bazangula.
23 De la Eternulo ĉi tio fariĝis, Ĝi estas
miraklo en niaj okuloj.
24 Ĉi tiun tagon faris la Eternulo; Ni
ĝoju kaj gajiĝu en ĝi.
25 Ho Eternulo, helpu! Ho Eternulo,
sukcesigu! –
26 Estu benata tiu, kiu venas en la
nomo de la Eternulo! Ni benas vin el
la domo de la Eternulo.
27 La Eternulo estas Dio, kaj Li lumas
al ni. –

# Hereza evangelio

Prelegserio de József Farkas, hungara reformita pastoro, aŭtune 1969

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Moto:

> Laŭ liaj samtempuloj Jesuo estis herezulo, nur poste lia instruo fariĝis evangelio. Kiam Luther komencis prediki la nove ekkomprenitan evangelion, oni akuzis lin pri herezo, nur poste lia scio fariĝis reformatora pravo. Kiu kuraĝas hodiaŭ prediki tiun herezan evangelion, kiu morgaŭ fariĝos ĉiutaga pano al kristanoj?

## Mens-higieno 2

Feliĉa estas tiu, kies krimo estas pardonita,
Kies peko estas kovrita.
Feliĉa estas la homo, al kiu la Eternulo ne kalkulas lian kulpon
Kaj en kies spirito estas nenia malvero. –

Kiam mi silentis, miaj ostoj senfortiĝis
De mia ĉiutaga ploregado.
Ĉar tage kaj nokte pezis sur mi Via mano;
La freŝecon de miaj sukoj anstataŭis sekeco de somero.

Psalmoj 32, 1–4

En la bela, malnova hungara traduko oni trovas en la lasta linio de la citaĵo, ke "mia vivoforto langvoris kiel en la somera varmego".

Mia vivoforto langvoris – tiujn vortojn mi nun levas kaj metas en la centron de mia hodiaŭa prelego. Antaŭ jarmiloj diris tion la psalmisto, tamen ni sentas proksime kaj konate tiun ĉi konfeson. Mi pensas, ke vi sen iu ajn klarigo komprenas, pri kiu temas tiuj vortoj. Mi ŝatus, se nun ia adoremo plenigus nin: antaŭ jarmiloj iu diris tion, kaj poste venis jarcentoj, jarmiloj, la homo saĝiĝis, grandiĝis. Kion la homo eltrovis! La elektron, la nuklean fizikon, flugis al la luno. Kaj post jarmiloj ni daŭre estas samloke: mia vivoforto langvoris. Kaj ankaŭ hodiaŭ estas nia plej baza demando: kiel eblus revivigi nian

vivoforton? Ĉar en tiu ĉi langvoro, laciĝo, senpoveco ne eblas vivi.

Jen, tiu ĉi estas la Sankta Skribo! Dum jarmiloj sonoras en ĝi la verecoj, konfesoj, preĝoj, kiuj nenion perdis de siaj fortoj kaj lumoj. Kompare kun la malnova psalm-skribanto nur tio estas la diferenco, ke ni pli bone komprenas tion, kion li preskaŭ nur instinkte diris. Tiujn vortojn, ke "mia vivoforto langvoris" per la helpo de la modernaj sciencoj ni pli bone komprenas, ol li komprenis. Li prenis bildon de la naturo kaj en tiun bildon li vestis sian travivaĵon: "La freŝecon de miaj sukoj anstataŭis sekeco de somero". La bildo montras, kiu estis antaŭ la psalmisto. Li vivis en loko, kie ne troviĝis multe da akvo, kie tempo post tempo dezertaj ventoj blovis kaj la folioj de la plantaĵoj langvoris. Kaj se estis longa la sekeco, kaj la plantaĵo jam ne plu havis internan rezervon, la cirkulado de la likvo, la interna vivoforto langvoris.

La psalmisto sentis, ke tiu ĉi sekiĝo, langvoriĝo de la plantaĵo aŭtentike priskribas la internan malfortiĝon. Ankaŭ lia vivoforto langvoras, se ne estas rezervo aŭ se estas tro forta la fajro de la ekstera atako.

Tiun ĉi konfeson ni jam pli bone komprenas hodiaŭ. Venis la diversaj sciencoj, kiuj okupiĝas pri homo: psikologio, antropologio, eĉ biologio, kaj per ilia helpo ni jam pli bone komprenas tiujn vortojn. Mia hodiaŭa tasko estas, ke mi alproksimigu al via pensado tion, kion vi jam certe spertis kaj travivis: *mia vivoforto langvoris*.

Baze estas grava aksiomo, ke la vivofortoj ne naskiĝas en ni mem, ili nur trairas nin. Kiel ĉe la plantaĵoj: ne la plantaĵo mem produktas la likvon, la sukon kiu vivigas ĝin. Ĝi nur per siaj radikoj prenas, suprensuĉas la akvon, akceptas ĝin al sia interna cirkulado, uzas ĝin – kaj poste la plantaĵo bezonas denove kaj denove senmankiĝo, alie ĝi mortas. Ne estas alimaniere ĉe la homo: li iel prenas la vivofortojn, uzas ilin, kaj poste li denove kaj denove devas preni ilin. Kaj ni denove estas en la teritorio de mens-higieno, kaj tion ni devas nun esplori, ke kiuj estas la reguloj, la leĝoj de tiu ĉi fortofluo, fortocirkulado.

La scienco eltrovis siajn proprajn fakajn esprimojn pri la fortofluoj: instigoj aŭ motivoj. En la homoj moviĝas instigoj, motivoj kaj ili gvidas la homan vivon. Sed la medicino mem konfesas, ke tio ĉi estas sufiĉe mistera teritorio. La mistero de la forto daŭre estas mistero! Ni ne sukcesis ekkompreni tiun ĉi sekreton: kiel estiĝas, kie estiĝas, kiel enfluas en la homon, kiel trafluas el unu homo al la alia la vivoforto. Malmulte la scientistoj jam scias, sed ni ankoraŭ devas multe lerni pri tio.

Ili jam ekkomprenis, ke inter la multaj motivoj en la pli altnivela homa vivo elformiĝas unu tielnomata gvida instigo, gvida motivo. Ĉiuj homoj defendas sin kontraŭ malvarmo kaj malsano, kiel povas esti motivo malsato aŭ timo. Tiuj movas, aktivigas la homon fari ion. Sed tiam la vivo komencas esti homa vivo, kiam malantaŭ aŭ super tiuj multaj diversaj part-motivadoj klariĝas

la “gvid-motivo”, la penso, la celo por kio la homo vivas. Nuntempe al multaj homoj tiu ĉi gvid-motivo estas la mono. Al aliaj homoj estas la arto aŭ la scienco. Apostolo Paŭlo tiel konfesis laŭ la malnova hungara traduko: “Al ĉio mi havas forton en Kristo, kiu fortikigas min” (Fil 4, 13). Preskaŭ per la vortoj de la mens-higieno diras Paŭlo: mi havas forton, mi havas motivon, al ĉio mi prenas sufiĉe da forto de Kristo, kiu gvidas min. Ni konas lian vivon, vere tiel estis. Brilis la vizio “Kristo” antaŭ li, kaj fariĝis lia gvid-motivo. El ekstero fluis en lin kaj poste trans li tiu ĉi motivo, kiu donis nekredeble grandan forton al Paŭlo. Kaj pri Paŭlo kaj pri tiu ĉi frazo de Paŭlo ni bone povas spekti, ke ne ni mem produktas la forton, la forto de ie enfluas kaj trafluas nin, faras sian taskon kaj dumtempe ni foruzas tiun ĉi forton. Do tio estas la unua veraĵo, kiun ni hodiaŭ devas ekkompreni: ni vivas en fortofluoj.

La dua, same grava penso estas, ke la homo konsistas el nepartigebla unueco, estas integra, kaj pro tio se venas motivo, tiu movas kaj la korpon kaj la animon de la homo. Ĵus pro tio, ĉar ne mi mem produktas la forton, kiu de ie venas kaj enfluas min kaj mobilizas mian korpon kaj mian animon. Estas aparta kaj interesa parto de la medicino la psikosomatiko, la komuna agado de animo kaj korpo. Estas erara penso, ke unu mobilizas la alian. Kiam iu forto enfluas en la homan vivon, samtempe movas la korpon kaj la animon. Se iu ekhavas belan animan motivon, tiu fortigas ankaŭ la korpon. Ni memoru pri apostolo Paŭlo! “Kristo” estis bela anima motivo, kaj fortigis lian korpon al grandiozaj fortostreĉoj kaj toleroj. En tiu malforta, rompiĝema korpo la motivoj kunportis grandiozajn venkojn. La korpo de Paŭlo ne rajtis esti malforta, ĉar Paŭlo havis grandajn taskojn, kiujn li devis plenumi, devis fari. Kaj lia malforta korpo plenumis la grandiozajn motivojn. Sed ankaŭ inverse okazas: se iu havas animan konflikton, brulas en li malamo, kolero, tio influas kaj paralizas ankaŭ la korpon.

Tiel ni komprenu tiun ĉi gravan ĉapitron de mens-higieno: la homo estas unu! De ekstero fluas fortojn en la homon, kaj samtempe movas la korpon kaj la animon. Se entuziasmiga, pozitiva, saniga fortofluo atingas la homon, tiam lia spirito flugas kaj ankaŭ la korpo preskaŭ rivecas flugilojn. Kaj inverse: se paralizigaj, enĉenigaj fortoj enfluas en nian vivon, ili faras nian animon malbonhumora, amara, senespera kaj samtempe niaj korpaj funkcioj malrapidiĝas, blokiĝas kaj ni malsaniĝas. Ĉar “nia vivoforto langvoris”.

La psalm-skribanto havis iun neordigitan aferon kun Dio, kaj li spertis, ke la vivoforto jam ne venas en sian vivon, eĉ eble malsaniga, paraliziga forto enfluas en sian vivon. Eksterordinare grave estas, ke integra estas la homo, kaj kiam atingas lin fortofluoj, tiam ili influas kaj la korpon, kaj la animon. Ni devas lerni ĝuste pensi pri nia korpo, ĉar ni jam longe pensas, ke la homo estas nur kemiaj kombinaĵoj,

biologiaj aferoj. Ni devus ekkompreni, ke nia korpo ne estas kreinta bazo de la fortoj, multe pli estas nia korpo la signa sistemo de la fortoj, kiuj trafluas nin. Tute ŝangus nia ĉiutaga vivo, se ni serioze akceptus, ke nia korpo estas la signa sistemo de io malantaŭa, de io nevidebla. Via korpo signas, en kia forto-reto vi estas, kiaj fortoj influas vin.

La trian grandan veraĵon mi tiel diras: tiujn fortofluojn plejparte ni travivas inter-persone, per rilatoj inter homoj. Estas baza kategorio de la moderna psikologio la interagado de homo al homo. La fortofluoj ne estas en la aero, ili atingas nin tra aliaj homoj, ili realiziĝas tra homoj.

Simplan aferon mi diras: lernado! Troviĝas infanoj, kiuj entuziasmas pri matematiko, pri muziko, pri gimnastiko. La detalaj esploroj klare montris, ke ne la beleco de la matematiko ravis tiujn infanojn, sed la personeco de la instruisto. Estis interpersona rilato inter ili, ne nepre konscie. La infano ekŝatis la instruiston, kaj pro tio ekŝatis ankaŭ la matematikon. Estiĝis interpersona rilato, fortofluo inter la instruisto kaj la lernanto: bona instruisto farigas duonon de la klaso entuzaismulo de matematiko. Ni ĉiam estas en kontaktoj kun homoj, ni ĉiam estas en interpersonaj rilatoj, kiuj povas esti aktivigaj, movigaj, feliĉigaj rilatoj – pro tio iu afero fariĝas nia afero, ĉar ni identigas nin per la homo, de kiu ni ricevas tiujn pozitivajn forto-fluojn.

Sed ankaŭ povas okazi, ke ni ricevas amaran, malfortigan, malbonhumorigan fortofluon!

Mia amiko, kiu estas doktoro, rakontis al mi instruan situacion, kies rolantoj estis vidvina patrino kaj ŝia filino. La patrino estis ĉirkaŭ kvindek jaraĝa, la filino estis pli ol dudek. Dum longaj jaroj ili vivis kune. Mia amiko estis ilia familia doktoro, li bone konis iliajn cirkonstancojn. La patrino estis tre malsana, nekredeble multe ŝi suferis, dum sep jaroj ŝi dudeksesfoje estis en hospitalo. La fidela filino fidele zorgis pri la kompatinda patrino, estis bela kaj neĝenita ilia rilato. Somere la filino havis eblecon vojaĝi eksterlanden, do la doktoro akceptis la taskon dumtempe zorgi pri la patrino. La filino forvojaĝis, sed atendis la tagon, kiam ŝi revenos kaj denove flegos la patrinon. Neatendite la filino dum sia vojaĝo renkontiĝis kun tre simpatia junulo, kaj ekfajris amo inter ili kaj ŝi restis eksterlande. La patrino restis sola, kies unu nura trezoro, espero, ĝojo estis ŝia filino. Kio okazos nun? En tia situacio la patrino aŭ mortos pro la grandioza ŝoko, aŭ dum unu momento resaniĝos. Tio dua okazis, la patrino resaniĝis, estas nun tute sana kaj ĝuas sian vivon. Interese?

Se ni iomete analizas la situacion, ni trovas vere simplan formulon. Ili du ludis rolojn, kiuj suplementis unu la alian. La patrino amis sian filinon, la filino amis sian patrinon, kaj ili esprimis tiun amon per la malsano. Per la malsano la patrino ŝnurigis la filinon al si mem, kaj per la flegado la filino montris sian infanan fidelecon. Kiam la rol-ludo dissaltis kiel bobelo, montriĝis ke estis forto-ludo, per kiu la patrino tenis sian filinon. Kiam la filino foriris, la ludo

perdis la kialon, la patrino finis kuŝi en la lito kaj ekde tiam ŝi estas sana. En tiu ĉi kazo baraj, bremsaj fortofluoj estis inter la du homoj. Ni devas rimarki, ke la malsano ne estis la fina realeco. La malsano estis ilo por atingi malantaŭan celon. La subscia celo de la patrino estis, ke neniu forprenu de ŝi la filinon, kaj pro tio venis novaj kaj novaj malsanoj, ke ne rompiĝu la rilato inter ili. Inter tiuj personaj rilatoj la fortoj fluas – aŭ blokiĝas. La kvalito de nia homa vivo dependas de niaj homaj rilatoj.

Kaj ni tuj povas fari la konkretan konsekvencon: se vi volas vivi sanan vivon, vi devas serĉi, vi devas trovi, vi devas preĝi por havi unu-du animajn gefratojn, bonajn geamikojn, kun kiuj vi povas esti en interpersonaj rilatoj. Sed ne en tia malbona, bara rilato, en kiu tiu patrino estis kun sia filino, sed en bona rilato, kie vi renkontiĝas, vi ĝojas unu pri la alia, vi preĝas. La esenco estas, ke estas interagado inter vi, ke vi estas en efika interpersona rilato. Vi donas unu al la alia la ĝojon kaj malĝojon, kaj vi havas parton de la vivo unu de la alia. Kompreneble la plej sana solvo estas se vi povas kune preĝi. Sed se vi ankoraŭ ne povas preĝi kune, ankaŭ tiam vi ambaŭ bezonas malpezigi la animon post la tuttaga streĉo, post la tuttaga deca sinteno. Tio estas terure laciga kaj la homo bezonas unu-du amikojn, ĉe kiuj li povas submeti la rol-maskon, la devigan konduton, kaj povas esti si mem. Se du homoj tiel estas kune, tie estiĝas fortofluo, tie refreŝiĝas la animo, tie la vivoforto repleniĝas.

Sed ni devas fari grandan, kvaran paŝon, tio estas la kvara penso, pri kiu mi denove rakontas mian propran travivaĵon.

Antaŭ kelkaj semajnoj mi vizitis unu el miaj amikoj, kaj kiam mi eksidis ĉe li, mi plendis, kiom laca mi estas. Mi diris al li, ke eblas sperti, ke mi maljuniĝas, mi jam ne povas tiel multe fari dum unu tago, kiel antaŭ dek-dudek jaroj. Kaj li respodis: haltu! Ne estas certe, ke via aĝo estas la kaŭzo de via laceco. Li diris, ke li spertis, ke kelkfoje la junuloj eĉ pli rapide laciĝas ol la maljunuloj. Kaj laŭ li, iu kosma laceco regas la homojn. Interesa esprimo: kosma laceco, kiu paralizas kaj la junulojn, kaj la maljunulojn. Kaj la maljunuloj preskaŭ pli bone eltenas tiujn fort-provojn ol la junuloj. Post nia interparolo mi ekkomprenis, ke kosma laceco malfortigas la homojn, ĉar la homo ŝiriĝis de la vera forto-fonto, de Dio! Jes, inter la homo estas forto-fluoj, tiu estas la vero. Sed la fina veraĵo de tiu ĉi pens-ĉeno estas, ke la forto mem estiĝas inter Dio kaj mi, kaj poste daŭren-fluas.

Mi prenas metaforon el la naturo. Troviĝas arboj, kiuj havas du diversajn radikojn. Unu el ili estas la ĉef-radiko, kiu vertikale, longe iras al la profundeco de la tero. La aliaj radikoj estas flankaj radikoj, kiuj iras horizontale. Se oni tranĉas la grandan gvidan radikon, la flankaj radikoj povas nutri la arbon, sed dum fortaj ŝtormoj la ĉef-radiko tenas ĝin. En sekaj tempoj la flankaj radikoj ne povas liveri sufiĉe da akvo, tiam la ĉefa radiko nutras la arbon. Se oni tranĉas la

ĉef-radikon, post certa tempo la arbo pereas.

Okazis ankaŭ je multaj homoj, ke oni tondis la gvidan radikon, kiuj iris al la plej profundajn regionojn, kiuj radikigis la homon al dia profundeco. Tiam la flankaj radikoj, kiuj estas la homaj rilatoj, post certa tempo jam ne povas doni ĉion, kion la homo bezonas.

Mi denove referencas Paŭlon: "Al ĉio mi havas forton en Kristo, kiu fortikigas min". Paŭlo havis ĉef-radikon: en Kriston li radikigis sin, kaj pro tio li havis forton al ĉio. Kaj la flankaj radikoj ĉu donas ĉu ne donas forton, ne estas tro grave, ĉar "al ĉio mi havas forton en Kristo". La nuntempa homaro devas provi, kia estas la homa vivo, kiam la ĉef-radiko ne donas forton. Ankaŭ la psalmisto havis la saman travivaĵon: mia vivoforto langvoris, ĉar mia rilato kun Dio konfuziĝis.

Kaj mi grandigis la malbonon per tio, ke mi silentis. Mi esperis, ke iel solviĝos la problemo, sed ne solviĝis, eĉ estis pli kaj pli malbona.

La egzegezistoj diras, ke laŭ la rememora pensado de la psalm-skribanto lia vera kulpo ne estis, ke li pekis. Ĉiuj homoj pekas. Ankaŭ mi, ankaŭ vi, ĉiutage denove kaj denove ni pekas. Nia granda kulpo ne estas, ke ni pekas, sed ke post nia peko, ni silentas. Ni pekis, kaj ni ne petas la rehabilitan helpon de Dio, kiun ni nomas indulgenco. Ankaŭ teologie estas valora tiu ĉi tezo, sed nun mi diras mens-higiene: ne tio estas la vera problemo, ke vi estas malforta, faliĝanta homo, ke vi denove kaj denove havas amarajn, malbonintencajn pensojn, seksajn dezirojn, ktp. La vera problemo estas, ke vi prisilentas! La vera problemo estas, ke vi povus iri, sed vi ne iras tien, kie vi povus kapti resanigajn fortojn. Vi ne iras al Dio, kiu povus pardoni vin. Tiu pardono simple ne estas, ke Dio kovras viajn pekojn kaj diras: bona, mia infano, vi ne estas perfekta, mi ne batas vin. Ne tio estas la indulgenco, sed tio, ke denove komenciĝas flui al vi la blokita amo de Dio.

> La sekreto de la fortofluo estas la rilato kun Dio, kaj poste la rilato kun homoj.

La sekreto de la fortofluo estas la rilato kun Dio, kaj poste la rilato kun homoj. Dio estas fora, la interpersona rilato kun Dio estas malfacila. Pro tio Dio kompatis nin kaj donis al ni Jesuon. En Jesuo eblas krei veran rilaton, fortofluan rilaton kun Dio. En Jesuo eblas paciĝi kun Dio, en Jesuo eblas ripari la rompitan rilaton kun Dio.

Preskaŭ despera estas, ke la homaro perdis la rilaton kun Dio, tranĉis sian ĉef-radikon, kaj pro tio homoj bezonas pli kaj pli da kemiaj instigoj, por povi iel vivi. La alkoholo jam ne sufiĉas, bezoniĝas drogoj, modernaj kemiaĵoj por povi senti feliĉon. Estas terure, sed kompreneble, ĉar sen forto ne eblas vivi, do homoj bezonas narkotikojn, instigajn medikamentojn. Kontraŭ tiu artefarita forto, kontraŭ tiu manipulado kiu mortigas kaj la korpon kaj la animon

sonas nia simpla kredkonfeso: per la helpo de Kristo ni retrovas la vojon al nia ĉiela Patro kaj resaniĝas nia vivo. Ni vivas en la viviga, rekrea forto-fluo de Dio.

La komunumo estas tiu Dio-indikita loko, kie vi povas ekkoni Jesuon Kriston, kie vi povas fari kontakton, kie vi povas trovi animajn gefratojn, bonajn geamikojn. La komunumo estas la sanatorio de Dio, kie la lacaj vivofortoj grandioze renoviĝas. Ne kulpigu Dion, se Li ne povas revivigi vian langvoran vivoforton, kiam vi evitas Lian sanatorion!

# Gardanĝeloj

Siegfried KRÜGER, DE



Anĝeloj estas konsiderataj kiel mesaĝistoj de la ĉielo, kiel potencaj, konsolaj kaj kompreneblaj simboloj por la nuna Dio. Anĝeloj ĉiam montras preter si al la ĉiela patro. Tio estis komence de la historio de nia malgranda bronza anĝelo kun siaj benantaj manoj. La arte desegnita figuro mem ne povas fari ion. Sed ŝi memorigas al ni la promeson: “La Sinjoro ordonis al siaj anĝeloj, ke ili gardu vin dum via vojo, ke ili portu vin sur siajn manojn kaj ke vi ne frapu vian piedon kontraŭ ŝtono.”

Pli da informo (germanlingve) ĉe: https://tinyurl.com/y36gthvu

# Internacia preĝosemajno 2021

## Restadu en mia amo kaj vi multe fruktodonos (Joh15,5–9)

Raportis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Malgraŭ la pandemio kaj la nekutimaj cirkonstancoj ankaŭ ĉi-jare okazis la internacia preĝsemajno por la unueco de kristanoj.

Per la moderna tekniko (Zoom) ni kolektiĝis kaj kunpreĝis dum ok tagoj.

IKUE prezidantino Marija Belosevic sinofere organizis ĉion: ŝi sendis la petitajn invitilojn, akceptis nin en virtualan komunumon, disdonis inter nin la legindajn tekstojn, dum la preĝado projekciis la kantojn kaj la tekstojn. Stefan Lepping kantis kaj per gitaro akompanis nin. Multajn dankojn al ili ambaŭ!

Ĉiuvespere la preĝadon sekvis aliaj programeroj: plejparte bildmontradoj pri antaŭaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj, sed en unu vespero ni havis interesan prelegon pri la preĝejoj en Triesto, kaj sabate rosarion.

Estis granda ĝojo almenaŭ sur la ekrano vidi 20-25 malnovajn geamikojn, gefratojn.

La *Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 2021* estis preparita de la Monaĥa Komunumo de Grandchamp. La temo elektita: "Restadu en mia amo kaj vi multe fruktodonos" estas bazita sur Johano 15,1–17 kaj eksplikas la vokiĝon por preĝado, repaciĝo kaj unuiĝo en la eklezio kaj en la homa familio de la grupo de Grandchamp. En la jaro 1930 nombro de reformitaj virinoj de francdevena Svislando, apartenantaj al grupo konata kiel la Virinoj de Morges, retrovis la gravecon de la silento, aŭskultante la Dian Vorton. Samtempe ili revivigis la praktikon de spiritaj retiriĝoj por riĉigi sian fido-vivon, inspiritaj de la ekzemplo de Kristo, kiu apartiĝis por preĝi. Aliaj baldaŭ aliĝis, partoprenante regule organizitajn retiriĝojn en Grandchamp, vilaĝeto apud la bordoj de lago Neuchâtel. Sekve, oni bezonis trovi konstantan ejon por preĝi kaj bonvenigi la kreskantan nombron de gastoj kaj retiriĝantoj. Hodiaŭ la komunumo entenas kvindek monaĥinojn, ĉiuj el diversgeneracioj, ekleziaj tradicioj, landoj kaj kontinentoj.

En sia diverseco, la monaĥinoj similas al vivanta, kuraĝiga alegorio. Ili okazigas preĝad-vivon, komunian vivadon kaj prizorgas la bonvenon de gastoj. La monaĥinoj kundividas la plenumon de la monaĥina kuniĝo kun vizitantoj kaj helpantoj kiuj vizitas Grandchamp por preĝi, silenti, spiritsaniĝi, aŭ serĉi la viv-percepton.

Kiel personoj, kiel komunumo, kiel tuta eklezio, ni devas unuiĝi en Kristo, akceptante Lian ordonon, nome: ami unu la alian samkiel Li amis nin (Joh 15,12). Se oni restas en Kristo, la fonto de ĉia amo, do la frukto de komuneco kreskas. La komuneco kun Kristo postulas komunecon kun la aliaj homoj.

Doroteo de Gaza, monaĥo en Palestino dum la 6-a jarcento, esprimis tion jene: Vi imagu cirklon desegnitan sur grundo, tio estas, cirklan linion desegnitan per cirkelo kaj kun centro. Vi imagu, ke tiu cirklo estas la mondo, la centro estas Dio kaj la radioj estas la malsamaj vojoj aŭ vivmanieroj de la popolo. Kiam la sanktuloj, dezirante esti desegnitaj proksime de Dio, marŝas al la centro de la cirklo, tiam ju pli ili penetras en ĝian internon, des pli ili fariĝas pli kaj pli proksimaj unuj al la aliaj; kaj, ju pli ili estos proksimaj unuj al la aliaj, des pli ili estos proksimaj al Dio. Ni komprenas, ke la samo aplikiĝas en inversa maniero, kiam ni malproksimiĝas de Dio kaj marŝas ĝis la ekstero de la cirklo. Do evidentiĝas, ke, ju pli ni malproksimiĝas de Dio, des pli ni malproksimiĝas unuj de la aliaj kaj, ju pli ni malproksimiĝas unuj de la aliaj, des pli ni fariĝas malproksimaj al Dio. Serĉi la proksimecon kun la aliaj homoj, vivi kune en komuneco kun la aliaj homoj foje tre malsimilaj al ni, eble estas defio. La fratulinoj de Grandchamp konas tiun ĉi defion, kaj al ili la instruo de fratulo Roĝer de Taize estas tre utila: "Ne ekzistas amikeco sen puriganta sufero. Ne ekzistas amo al nia proksimulo sen la kruco. Nur la kruco permesas al ni la konon pri la nekomprenebla profundeco de la amo". La dividoj inter kristanoj, kiuj malproksimiĝas unuj de la aliaj, estas skandalo, ĉar ili malproksimigas nin ankaŭ de Dio.

Multaj kristanoj, movataj de la malĝojeco de tia situacio, fervore preĝas al Dio por la restarigo de tia unueco, pri kiu Jesuo preĝis. La preĝo de Jesuo por la unueco estas invito por ke ni revenu al li kaj tiel ni fariĝu pli proksimaj unuj de la aliaj kaj kune ĝojos pri la riĉeco de nia diverseco.

### Unua tago

Vokitaj de Dio – "Vi ne elektis min, sed mi elektis vin" (Joh 15,16)

Gen 12,1-4 La voko de Abram
Joh 1,35-51 La voko de la unuaj disĉiploj

### Medito

Komence okazas renkontiĝo inter la homo kaj Dio, inter la kreito kaj la Kreinto, inter la tempo kaj la eterneco. Abram aŭdas la vokon: "Iru el via lando... al la lando, kiun Mi montros al vi". Same kiel li, ĉiu el ni estas vokita lasi tion, kio estas al ni kara, por iri al la loko, kiun Dio preparis en la profundo de niaj koroj. Survoje, ni ĉiam pli fariĝas ni mem, kiel Dio volis nin de la komenco. Sekvante la alvokon adresitan al ni, ni fariĝas beno al ĉiuj proksimuloj kaj al la mondo. Dio, en Sia amo, serĉas nin. Li fariĝis homo en Jesuo, en kiu ni renkontas Lian rigardon. En nia vivo, kiel en la Evangelio de Johano, la voko de Dio estas aŭdata diversmaniere. Tuŝitaj de Lia amo, ni ekiris. En ĉi tiu renkonto ni spertas la vojon de transformado. Brila komenco de ama rilato, kiun ĉiam necesas renovigi.

*Iun tagon vi komprenis, ke sen via konsento, "jes" jam estis gravurita en la profundo de via estaĵo. Kaj vi elektis antaŭeniri sekvante Kriston. Silente en la ĉeesto de Kristo, vi ekkomprenis Lian vorton: "Venu kaj sekvu Min, Mi donos*

*al vi lokon, kie ripozos via koro“.* (La fontoj de Taizé (2000) paĝo 52)

## Dua tago

Maturiĝante interne – “Restadu en mi, kaj mi en vi” (Joh 15,4a)

Efe 3,14-21
Luk 2,41-52

## Medito

La renkonto kun Jesuo vekas la deziron resti ĉe Li kaj resti en Li: tempo por la frukta maturiĝo. Estante tute homa kiel ni, Jesuo kreskis kaj maturiĝis. Li vivis simplan vivon enradikitan en la praktikoj de la juda fido. Dum Lia kaŝita vivo en Nazaret, kie ŝajne nenio eksterordinara okazis, la ĉeesto de la Patro nutris Lin. Maria kontempladis la agojn de Dio en sia vivo kaj en tiu de sia Filo. Ŝi valorigis ĉiujn tiujn aferojn en sia koro. Tiel, malrapide, ŝi ĉirkaŭbrakis la misteron de Jesuo.

Ni ankaŭ bezonas longan periodon de maturiĝo, unu tutan vivon, por kapabli droni en la profundecojn de la amo de Kristo, por lasi, ke Li restadu en ni kaj ni en Li. Nesciante kiel, la Spirito loĝigas Kriston en nia koro. Kaj estas per la preĝo, aŭskultante la Parolon, kundividante ĝin kun la aliaj, praktikante tion, kion ni komprenas, ke nia interno estas fortikigita.

*“Lasante Kriston malsupreniri al la profundecoj de nia estaĵo... Li eniros en la regionojn de la menso kaj de la koro; Li atingos nian karnon ĝis nian plian profundan estaĵon, por ke ni ankaŭ spertu iam la profundecojn de la mizerikordo“.* (La fontoj de Taizé (2000) paĝo 134)

## Tria tago

Esti unu korpo – “Ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis” (Joh 15,12b)

Kol 3,12-17
Joh 13,1-15, 34-35 Unu amu la alian

## Medito

La vesperon antaŭ la morto Jesuo antaŭ Siaj disĉiploj kliniĝis por piedlavo. Li ja konis la malfacilaĵojn de komuna vivo kaj la gravan rolon de pardonpreteco kaj reciproka servado. “Se mi ne lavas vin“, li diris al Petro, “vi ne plu havos parton de mi.“ Petro ja akceptis la geston de Jesuo laviĝonte kaj tuŝiĝonte de la humileco kaj la mildeco de Kristo. Pli malfrue li imitis la ekzemplon de Jesuo servante la komunumon de la fideluloj en la praa Eklezio. Jesuo Kristo volas ke vivo kaj amo trafluu nin kiel kreskaĵa suko tra vinberujo, por ke la kristanaj komunumoj formu unu korpon. Kaj hodiaŭ kaj pasintece, kunvivo ne ĉiam facilas! Ofte ni klare vidas niajn proprajn limojn. Ne ĉiam ni sukcesas ŝati tiujn kiuj proksimas al ni socie, kolektive, familie. De tempo al tempo niaj rilatoj komplete rompiĝas. En Kristo ni estas invitataj surmeti kompatemon kaj ĉiam denove aŭdaci novan komencon. La certeco esti amataj de Dio movas nin, ke unu bonvenigu la alian kun ĉiaj fortoj kaj malfortoj. Tiam Kristo troviĝas en nia mezo.

*“Per kvazaŭ nenio vi kreas repaciĝon en la mistero de komunumo, do en la Eklezio. La komuna engaĝiĝo spronas*

*vin – ĝoju! Vi ne plu estas sola, en ĉio vi iras la vojon kune kun viaj gefratoj. Kun ili vi estas vokita realigi parabolon de solidareco.“* (Frère Roger, Liebe aller Liebe. Die Quellen von Taizé, Freiburg/ Basel/Wien (1990) paĝoj 61-62)

## Kvara tago

Ni petu komune – "Mi jam ne nomas vin sklavoj ... sed mi nomis vin amikoj" (Joh 15,15)

Rom 8,26

Luk 11,1

## Medito

Dio deziras kontakti nin. Li serĉas nin tiel, kiel li serĉis Adamon, kiam Li kriis al Adamo: "Kie vi estas?" (Gen 3,9)

Dio renkontas nin en Kristo. La vivo de Jesuo estis preĝo. Li estis en la preĝo intime kune kun Sia Patro kaj interamikiĝis kun siaj disĉiploj kaj kun ĉiuj, kiujn Li renkontis. Li permesis al ili havi tion, kio estis al Li la plej valora: esti en amplena interrilato kun lia Patro, kiu estas ankaŭ nia Patro. Jesuo kaj la disĉiploj sekvis la riĉan judan tradicion kaj kantis komune la psalmojn. Sed kelkfoje Jesuo retiriĝis, por ke Li preĝu sole.

Ni povas preĝi kune kun iuj aŭ sole. La preĝo povas esprimi admiron, peton, dankon aŭ simple nur silenton. Kelkfoje ni volonte petus, nur ni ne scias, kiel. Kiam ni turniĝas al Jesuo kaj ni petas Lin "Instruu nin preĝi", tio jam preparas la vojon. Jam la "volo por preĝado" estas preĝo.

Kunveni kun iu grupo povas esti granda helpo. La komunumo kreskas tra kantoj, vortoj kaj silentoj. Kiam ni komune preĝas kun kristanoj de aliaj tradicioj, ni travivas tiun ĉi neatendindan sperton, ke ni unuiĝas tra neapartigebla amikeco, por kio ni estas dankemaj por la ununura Dio. La formoj povas esti diversaj, sed la Spirito estas unu, kiu kondukas nin unu al alia.

*"Dum la komunaj preĝoj ofte la amo de Jesuo ĝermas en ni. Ni pri tio eĉ ne konscias. La komuna preĝo ne absolvas nin de la persona preĝo. Unu portas la alian. Ni kaptu ĉiutage la momenton por renovigi nian intiman interligon kun Jesuo Kristo.*" (Frère Roger, La fonto de Taizé, Taizé (1980) paĝo 20)

## Kvina tago

Preta al ŝanĝiĝo per la vorto – "Jam vi estas puraj pro la vorto" (Joh 15,3)

Rea 30,11-20 La vorto estas tute proksima al vi

Mat 5, 1-12 Feliĉaj estas vi

## Medito

La vorto de Dio estas tute proksima al ni. Ĝi signifas benon kaj promeson de feliĉo. Se ni malfermas niajn korojn, Dio parolas al ni kaj li ŝanĝas pacience ĉion en ni, kio estas formortinta. Li forigas tion, kio malhelpas la kreskadon de vera vivo, same kiel vinberisto tranĉas viton.

Kiam ni solaj aŭ grupe meditas biblian tekston, tiam ŝanĝiĝas nia perspektivo. Multaj kristanoj ĉiutage preĝas la beatigojn. Tiuj revelacias al ni feliĉon, kiu estas kaŝita en neplenumeblo, feliĉo troviĝas trans suferado: Feliĉaj estas, kiujn la Spirito tuŝis, tial, ke ili ne plu retenas siajn larmojn, sed kiuj lasas flui siajn larmojn kaj tial

konsoliĝas. Ili malkovras la fonton, kiu kaŝiĝas ene de si. Tial en ili kreskas malsato al justeco kaj soifo al komuna engaĝiĝo por mondo de paco. Ĉiam ni estas vokitaj renovigi nian engaĝiĝon por la vivo per nia pensado kaj agado. Fojfoje ni jam ĉi tie travivas antaŭguston de la beno, kiu estos perfekta je la fino de la tempoj.

*"Preĝu kaj laboru, ke Lia regno venu. La vorto de Dio vivigu en via tago laboron kaj ripozon. En ĉio konservu la internan silenton por resti en Kristo. La spirito de la feliĉigoj trapenetru vin: Ĝojo, simpleco, kompatemo"*. (La fratulinoj de Grandchamp ĉiutage preĝas)

## Sesa tago

Akcepti la aliajn – "Por ke vi iru kaj donu frukton; kaj ke via frukto daŭru" (Joh 15, 16b)

Gen 18, 1-5 Abrahamo akceptas la anĝelojn en la arbareto Mamre

Mar 6,30-44 La kortuŝiĝo de Jesuo pri la homamaso

## Medito

Kiam ni lasas nin transformi de Kristo, Lia amo kreskas, kaj fruktiĝas en ni. Akcepti la aliulon estas konkreta maniero dividi la amon, kiu ene de ni estas. Laŭlonge de Sia vivo, Jesuo akceptis ĉiujn, kiujn Li renkontis. Li ilin aŭskultis, kaj lasis sin esti tuŝata, ne timante ilian suferon. En la rakonto pri la multobligo de la panoj, Jesuo vidante la malsatan homamason kortuŝiĝas kaj ilin kompatas. Li scias, ke la tuta homaro bezonas esti nutrata, kaj ke nur Li vere kapablas forigi la malsaton je pano kaj la soifon je vivo. Sed Li ne deziras tion fari sen la partopreno de la disĉiploj; ne sen la malmulto, kion ili povis oferi: kvin panojn kaj du fiŝojn.

Same hodiaŭ Li vokas nin esti Liaj kunlaborantoj je Lia senkondiĉa zorgo pri la aliaj. Kelkfoje io tiom malgranda kiel afabla rigardo, atenta aŭskultado, aŭ nia nura ĉeesto sufiĉas por ke homo sentu sin akceptata. Kiam ni oferas al Jesuo niajn simplajn lertojn, Li ilin utiligas je miriga maniero. Tiam ni spertas, kion spertis Abrahamo, ĉar dum donacado estas, kiam ni ricevas, kaj kiam ni akceptas la aliajn, ni abunde estas benataj.

*Kristo mem estas tiu, kiun ni gastigas.* (Angla- kaj franclingva versioj de la Regularo de Taizé (2012) paĝo 103).

*Ĉu la homoj, kiujn ni tagon post tago akceptas, trovos en ni viroj kaj virinoj lumaj per Kristo, nia paco?*(La fontoj je Taizé (2000) paĝo 60).

## Sepa tago

Kreskante en unueco – "Mi estas la vinberarbo, vi estas la branĉoj" (Joh 15,5a)

Kor 1,10-13; 3, 21-23 Ĉu Kristo estas dividita?

Joh 17,20-23 Kiel vi kaj mi estas unu

## Medito

La tagon antaŭ la morto, Jesuo preĝis por la unueco de tiuj, kiujn la Patro donis al Li: "por ke ĉiuj estu unu ... por ke la mondo kredu". Aliĝinte al Li, kiel branĉo estas ligita al la vinberujo, ni dividas la

saman sukon, kiu cirkulas inter ni kaj vigligas nin. Ĉiu tradicio celas konduki nin al la koro de nia fido: komuneco kun Dio, per Kristo, en la Spirito. Ju pli ni vivas ĉi tiun komunecon, des pli ni estas ligitaj al aliaj kristanoj kaj al la tuta homaro. Paŭlo avertas nin kontraŭ sinteno, kiu jam minacis la unuecon de la unuaj kristanoj: absolutigi sian propran tradicion malutile al la unueco de la korpo de Kristo. Tiuj diferencoj dividas anstataŭ reciproke riĉigi. Paŭlo havis tre larĝan vizion: "Ĉio apartenas al vi, kaj vi al Kristo, kaj Kristo al Dio" (1 Kor 3,22–23). La volo de Kristo devigas nin al vojo de unueco kaj repaciĝo. Ĝi ankaŭ devigas nin kunigi nian preĝon al lia: "por ke ĉiuj estu unu ... por ke la mondo kredu "(Joh 17,21).

*Neniam rezignu vin al la skandalo de la disiĝo de kristanoj, kiuj tiel facile konfesas amon al sia proksimulo, kaj tamen restas dividitaj. Faru la unuecon de la korpo de Kristo via pasia zorgo.*

(La Regulo de Taizé en la franca kaj la angla (2012) paĝo 13)

## Oka tago

Repacigi kun la tuta kreitaĵo – "Por ke mia ĝojo en Vi restadu, kaj Via ĝojo estu plena" (Joh15, 11)

Kol 1,15-20 En Li, ĉio ekzistas

Mar 4,30-32 Kiel senapa semeto

## Medito

La himno al Kristo el la letero al la Koloseanoj invitas nin laŭdi la savon de Dio, kiu ampleksas la tutan universon. Per Kristo, krucumita kaj resurektinta, vojo de repaciĝo malfermiĝis: ankaŭ la kreitaĵo estas destinita por estonteco de vivo kaj paco. Kun la okuloj de la fido ni vidas ke la Dia regno estas realeco tre proksima al ni, sed tamen, ankoraŭ eta, preskaŭ nevidebla kiel senapa semeto. Tamen, ĝi konstante kreskis. Eĉ en la aflikto de nia mondo, la Spirito de la Resurektinta agadas. Li kuraĝigas nin partopreni – kune kun ĉiuj bonvolaj homoj – en la senlaca serĉado de justeco kaj paco, por ke la Tero denove fariĝu hejmo por ĉiu kreitaĵo. Ni partoprenas en la agado de la Spirito, tial ke la kreitaĵo, en ĉiu sia pleneco, daŭre laŭdu Dion. Kiam la naturo suferas, kiam homoj estas disbatitaj, la Spirito de Kristo resurektinta, tute ne permesas al ni malkuraĝiĝi, male, Li invitas nin partopreni en Lia resaniga ago. La vivnoveco kiun Kristo alportas, eĉ se kaŝita, estas lumo de espero por multaj. Ĝi estas fonto de repacigo por tuta kreitaĵo kaj enhavas ĝojon kiu venas de preter ni: "Por ke mia ĝojo en Vi restadu, kaj Via ĝojo estu plena"(Joh 15,11).

*Ĉu vi volas celebri la vivnovecon, kiun Kristo donas pere de Sankta Spirito kaj fari, ke ĝi vivu en vi mem, inter ni, en la Eklezio, en la mondo kaj en la tuta kreitaĵo?* (Dua promeso dum la enirceremonio en la Komunumon de Grandchamp)

La libreto por la preĝosemajno estas elŝutebla ĉe: http://bit.ly/2XJ3MlF

# Ĉerpo el la diskutlisto de Dia Regno

Sendita de Nathan Gant, Usono

Laŭ Jeĥezkel 44:23, Levidoj 10:10 kaj aliaj ĉapitroj en Levidoj, ĉi tiuj bibliaj pasejoj admonas nin agnoski ke breĉo ekzistas inter ordinara civila socio kaj la sanktaj observoj de religio.

"Por ke vi diferencigu inter sanktaĵo kaj ordinaraĵo kaj inter malpuraĝo kaj puraĝo..."

Alivorte, konservi la disiĝon inter eklezio kaj la ŝtato. Apartigi la profanon de la dia. Mi aparte zorgas pri la kunlaboro de usonaj religiestroj en diversaj partoj de la gubernio por daŭrigi la absurdajn farson kaj trompon, specife ke la elektoj de novembro 2020 estis "ŝtelitaj" kaj la demokratiaj elektoj en Usono ne estis faritaj juste. Estas religiaj gvidantoj, kiuj nun citas el la biblio, por instigi pli da tumultoj. Unu pastro el Teksaso informis siajn eklezianojn plenumi ordonon de ribelo, dirante: "Forigu la murojn de Jeriĥo. La Sinjoro diras, ke via Jeriĥo estas Vaŝingtono, Tio estas via fortikigita urbo."

Mi skribas post terura atako kontraŭ la konstruaĵo de la usona kapitolo merkrede, la 6an de januaro 2021. Post tio, akuziga oficiala denunco aŭ akuzo rilante al la usona prezidanto estis la pravigebla reago de politikaj gvidantoj al la morto kaj detruo de la senpripensaj tumultoj en Vaŝingtono. Mi fieras scii, ke ni fine nun havas katolikon, kiu estis laŭleĝe elektita Prezidanto de Usono. Mi ne denuncas la eklezion entute pro la agoj de kelkaj religiaj gvidantoj. Estas tiuj reakciemaj homoj, kiuj funkciis ene de la senkulpaj kaj bonaj konstruajoj de religia organizo, tiuj homoj, kiujn mi konsideras danĝeraj en socio, kiu ne respektas la religian liberecon. Ripetante malverojn ree kaj ree, tia ke ĝi ŝajnas havi bazon de fakto. Mi memoras, ke antaŭ cent jaroj en Italio 1922, estro de la Nacia Faŝisma Partio Benito Mussolini faris ardan paroladon ĉe politika amaskunveno kaj kiu tiam kuraĝigis siajn armitajn subtenantojn en marŝo, kiuj sturmis la italan ĉefurbon, la tiel nomatan "Marŝon kontraŭ Romo". Kunmetita de ĉirkaŭ 30 000 faŝismaj partianoj kaj kiuj baldaŭ faligis la respublikon. Multaj el ĉi tiuj faŝistoj estis devote katolikaj. Ankaŭ Pio la 11-a subtenis la faŝisman kompanian ŝtaton en encikliko Quadragesimo Anno, kiu instigis ankaŭ Hitler kaj generalon Franco akiri diktatorajn potencojn. Mi ne denuncas la eklezion pro tiu historio. Anstataŭe mi malakceptas tiujn reakciulojn ĉi tie en Usono, kiuj agis maletike en la senkulpaj kaj bonaj konstruaĝoj de religia organizo.

*"Kiuj povas kredigi al vi absurdaĵojn, ili povas igi vin fari kruelaĵojn."*

Voltaire

# La malegal(ig)a viruso


## Ĉerpo el raporto de la helporganizo Oxfam prezentita la 25an de januaro ĉe la mondekonomia forumo en Davos

La nova raporto de Oxfam pri malegaleco malkaŝas, kiel KOVIM-19 tra la tuta mondo fortigas jam severan krizon de malegaleco.

KOVIM-19 havas la eblon pliigi ekonomian malegalecon en preskaŭ ĉiuj landoj samtempe. Pliiĝanta malegaleco signifas, ke estos bezonata almenaŭ 14 fojojn pli longa tempo por la homoj vivantaj en malriĉeco reveni al antaŭ-pandemiaj vivniveloj ol necesis por la 1 000 plej riĉaj homoj, kiuj plejparte estas blankaj viraj miliarduloj.

La raporto troviĝas en diversaj lingvoj ĉe https://tinyurl.com/yyukthjg

Post nur naŭ monatoj, la riĉeco de la 1 000 plej riĉaj miljarduloj reatingis sian antaŭan nivelon, sed por la plej malriĉaj homoj en la mondo, tio eble daŭros jardekojn.






112 milionoj malpli da virinoj estus en granda risko perdi siajn enspezojn aŭ laborojn se virinoj kaj viroj estus egale reprezentitaj en tiuj sektoroj, kiuj estas forte frapitaj de la pandemio.

Depost la komenco de la krizo, la pligrandiĝo de la riĉeco de la 10 plej riĉaj miliarduloj, estus sufiĉa por bari ke iu falu en malriĉecon pro la viruso kaj por pagi la vakcinon al ĉiuj.



La esploro, fare de la ekonomistoj pri la pandemia frapo, trovis ke:
87 % de respondantoj opinias ke la krizo pligrandigos la ekonomian malegalecon
56 % de respondantoj opinias ke la pandemio kaŭzos pli grandan seksan malegalecon.






# Retaj diservoj en Esperanto








Bildoj el la retaj diservoj

Pro la granda kaj laŭdinda laboro de Wolfram Rohloff kaj liaj pluraj diverslandaj kunlaborantoj, dum la pasintaj monatoj 7 diservoj estis dissenditaj pere de Jutubo [Youtube]. Se vi volas spekti/aŭskulti ilin, vi trovos ilin je la jenaj retaj adresoj‡:

29. mar 2020: https://tinyurl.com/yy6gskd4
25. apr 2020: https://tinyurl.com/y6m5ysce
30. maj 2020: https://tinyurl.com/yyqgfhlo
8. aŭg 2020: https://tinyurl.com/y2nbtk3x
4. okt 2020: https://tinyurl.com/y5qfhklg
29. nov 2020: https://tinyurl.com/y64z2w7j
25. dec 2020: https://tinyurl.com/y3xuq4ra

Reformacia tago - biblia leciono
31. okt 2020: https://tinyurl.com/yxjwkm5m

‡ Tiuj-ĉi adres-ligoj estas mallongigitaj por pli facile povu retajpi ilin. Ili ne similas, se vi havas ligojn de aliloke, sed same funkcias. /red

**Aliĝu al la gruplisto *keli-dia-regno+subscribe@googlegroups.com* por ricevi informon! Philippe Cousson estas administranto de la gruplisto. Anoncu vin!**

# Informetoj

## “Frapanta kaj inspira kun aŭtentikaj propraj poŝtmarkoj!”

Tiel skribas Deutsche Post pri la ebleco desegni kaj mendi siajn proprajn kaj personajn poŝtmarkojn – t.n. *Briefmarke indivduell.*

Al la redakcio venis la jena bildo de poŝtmarkoj pri la 100-jariĝo de Esperanto Blindulligo de Germanujo. Bona ideo kapti tiun eblecon fari reklamon, sed ŝajne nur por germanoj. /Red




---

Amikeco trans limoj

22–28 de februaro 2021

Jam de pli ol 40 jaroj la E-komunumo festas dum la lasta plena semajno de februaro la **Semajnon de Internacia Amikeco**, kiu pasas sub la devizo “Amikeco trans limoj”. La ideo lanĉita de Erik Carlén, sveda E-aktivulo, celis doni la okazon al esperantistoj tra la mondo organiziĝi por plifortigi la reciprokajn kontaktojn kaj senton de komuneco kun ĉiu, eĉ plej fore kaj izolite loĝanta esperantisto.

---

## Korektendaĵo

La kotiztabelo en la antaŭa numero enhavis malĝustan paginformon pri la kotizo al la germana KELI-sekcio.

Jen la ĝusta:

**Germanio** 25 EUR
Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V.
Banko: Evangelische Bank EG Kassel, Kiel
IBAN: DE20 5206 0410 0006 4349 16
BIC: GENODEF1EK1
Kasisto: d-ro Rudolf Fischer,
Gustav-Adolf-Str. 2a,
D-48356 Nordwalde,
0049 2573 / 626,
fischru<ĉe>uni-muenster.de



# Václav Lamr

## * 25. 4. 1943 – † 17. 12. 2020

**Václav Lamr** naskiĝis en Litovel, Ĉeĥio. Ellerninta masonisto li poste (1961 – 1964) finis art-industrian lernejon en Brno (pentroarto en arkitekturo) kaj laboris kiel stukisto, vidartisto en teatro, artterapeŭto, pri-zorgisto en psiĥiatria sanatorio kaj prizorgisto de handikapuloj. Antaŭ la jaro 1968 li publike prezentis ofte siajn pentraĵojn kaj organizis vesperojn de propra poezio en Brno kaj Prago. Post la okupacio de nia lando li ĉesis desegni kaj dek jarojn li aktivis kiel kontraŭleĝa misiisto kaj evangelizisto en "ne-registrita" komunumo en Brno. Li aktivis ankaŭ inter ciganoj en orienta Slovakio kaj pli poste li uzis siajn spertojn el tiu medio, kiam ilustris kelkajn ciganajn librojn. Li tradukis evangelion de Johano en ciganan lingvon. De la jaro 1979 li loĝis kun la edzino en Prago. Ili havis 2 filojn. Post la jaro 1980 li komencis denove pentri kun la intenco pere de sia kreado subteni evangelizadon. En la jaro 1991 li fondis ĉeĥan sekcion de internacia movado de kristanaj entreprenistoj (FGBMFI). En la kadro de sia misiista laboro li publikigis artikolojn, verkis poezion, aforismojn kaj pentris kristanajn motivojn. Denove multe ekspoziciis, ankaŭ eksterlande kaj ankaŭ en nia KELI kongreso en Janské Lázně (2000). Liaj pentraĵoj estis ofte publikigitaj en Dia Regno. Kun sia edzino li fondis misiistan unuiĝon *Christ art mission* (CAM) kaj kadre de *Forumo de engaĝitaj kristanoj* (FAK) aktivis en politiko. En lastaj jaroj li precipe aktualigis spiritan heredaĵon de ĉeĥa reformacio. Nia KELI-rondo esprimas sinceran kondolencon al edzino Marie kaj familioj de filoj. Václav restos en nia memoro.

*Pavel Polnický*





# Aŭskultu do! Nur amo estas Dio

(originale verkita en Esperanto)




AŬSKULTU DO! NUR AMO ESTAS DIO • M: Albrecht Kronenberger 2016-07-06, laŭ motivoj el la paska lumohimno *Exsultet*, por la poemo de Max Josef Metzger: Kristanoj! Ĉu la vorton vi forgesis • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2016-05-21.

| | |
|---|---|
| *1a strofo:* | *1 Joh 4,7; Rea 6,4-5; Mat 22,37; Mar 12,30; Luk 10,27; Lev 19,18; Mat 19,19; 22,39; Mar 12,31; Luk 10,27; Rom 13,9; Gal 5,14; Jak 2,8* |
| *2a strofo:* | *Gal 5,1* |
| *3a strofo:* | *Rom 8,2* |